

Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://storm.prohosting.com/jesuo/k54.htm>

<http://www.iespana.es/kajeroj.htm>



N° 54

Aprilo/junio 2002

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: **Juan Antonio Cabezas Martínez**,
c/ Jabonerías, 6-3^oD,
ES30 001 Murcia (Hispanio)

Sekretario: **José Pina Tuells**,
c/ St^a Teresa, 22-2^o CD,
ES30005 MURCIA

Libroservo: **María del Mar Guirao Gallego**,
Avd^a Juan Carlos I, 22-8H
ES300800 Lorca

Kasisto: **José María Bernabéu Franco**
Gral. Primo de Rivera, 8
E-03360 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Redaktoro: **Jesuo de las Heras**,
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Kajeroj el la Sudo regule interŝanĝas kun:

- 1 *Esperanto*, redaktata de Stano Marček,
 - 2 *Monato*, de Stefan Maul,
 - 3 *Juna Amiko*, de Geza Kurucz,
 - 4 *Sennaciulo*, de Krešimir Barkovič,
 - 5 *SAT-Amikaro*, de Jean Selle,
 - 6 *Internaciisto*, de Luis Serrano.
 - 7 *La Kancerkliniko*, de Jak le Puil,
 - 8 *Litova Stelo*, de Petras Čielauskas,
 - 9 *Liberecana Ligilo*, de Ĵakvo Schram,
 - 10 *Laŭtele*, de C. Baudé,
 - 11 *La Migrant*, de Antje Noordewier,
 - 12 *ES-TO*, de Aŭrora Bute,
 - 13 *SLEA-Informilo*, de P. Persson,
 - 14 *Naturista vivo*, de Jozefo Nemeth,
 - 15 *La verda proleto*, de komitato.
- Al ĉiuj, dankon pro viaj subteno kaj lernigo.

Pretigas la Kajeron:
Provkokrekto: **José Pina Tuells**
Redakto: **Jesús de las Heras Jiménez.**

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la nova konto
n^o **0182 1854 47 0202 655 116** en libreta de
BBVA. Sen aldona kosto. La abono kostas 1000
pesetojn aŭ 6 eŭrojn. Kvitancon oni ricevos.



Ne subskribitajn
artikolojn verkis
la redaktoro.

Oni povas
reprodukti
artikolojn,
konfide ke
oni citu la
originon.

Kovrilo: *La barelo de Montiljesko* estas fama rakonto
de Edgar Allan Poe. Mi prenis la desegnon, kiun faris
kaj publikigis Chris Cooper je [http://www.horla.co.uk/
productions/cask.htm](http://www.horla.co.uk/productions/cask.htm).

Enhavo

Redaktore	3
Informoj de la prezidanto	4
Plendo	5
La barelo de montiljesko	7
Esperanto instruado en publika bazlernjo de Lokossa	12
Ordinara renontiĝo de la estraro de HALE	14
La Faraono, ĉapitro 5-a	15
Dek unu insuloj	22
Enkonduko en muzikon: piano	23
Statuto de SAT	24

*Ni ne korespon-
dos pri nepetitaj
artikoloj. Tamen, ni
klopodos publikigi
ĉiun artikolon kies
enhavo estas intere-
sa kaj ne mistraktas
iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de
la artikoloj
respondecas la
aŭtoroj mem, ne la
redakcio.*

Redaktore:

La Faraono estas denove ĉe niaj paĝoj, kaj ni aldonas al niaj literaturamantoj la unuan tradukon en Esperanton —laŭ mia kono— de



la majstra rakonto pri venĝemo kaj cinikeco, *La barelo de montiljesko*, de Edgar Allan Poe, kiun oni povas legi en paĝo 7-a.

François Hounsou (Fransŭa' hunsundi') rakontas al ni pri la kurso, kiun li gvidas ĉe Benino, kio vere estas ekzemplo imitanda ĉe ni. Bedaŭrinde, ni ne havas lokon por montri ĉiujn fotojn, kiujn li sendis al ni, pri sia aktivado. En Interreto, tamen, oni povas vidi ilin ĉiujn je <http://www.iespana.es/Esperanto/marcel/>.

La 25-an de januaro kunvenis la tiama estraro de HALE. Tio, kion okazis tie, vi legos en paĝo 15-a, kaj rektan sekvon en paĝo 4-a.

Gari-n Mikle-n ne feliĉigis mia lasta artikolo pri SAT, do li precizigas kelkajn difinojn en paĝo 7-a. Mi ne revenos sur tiun aferon, do la leganto juĝu pri la aferoj de mi kaj de li komentitaj en niaj paĝoj.

Dubo estas pseŭdonimo de esperantisto, kiu sendis al mi amuzan priskribon de nia mondo, se malpligrandigita al insularo de kunuinsulo, kiu celas vian rideton, je paĝo 22-a.

La *Enkonduko en muzikon* ĉivice temas pri fortepiano, la plej grava instrumento muzika en nia civilizo. Kompreneble estas multe pli diri pri tiu muzikilo, kaj ni tion faros la venontan kajeron.

Mi ankaŭ deziras prikomenti tion, ke kelkaj anoj de HALE ne komprenas tute tion, ke oni povas havi deziron ekzerci sian rajton liberopini kaj liberpensi. Liberpenso ne estas tio, kion oni antaŭdifinis en koncerna asocio pli-malpli bondeziranta. Liberpenso estas rajto nerenoncebla, kaj ĝi agnoskas nenium nerifuteblan dion, heroon aŭ pensiston. Ĉe ni ŝajnas, ke kelkaj homoj de la estinto —tro ofte ankaŭ de la estanto—, kies elpensajoj estas kutime tiom logikaj kaj altiraj, ke oni *praktike ne rajtas* diskuti ilin aŭ aliajn pensojn iliajn. Tio estas grava eraro, kiu gvidas nur al dogmigo, kies kontraŭo estis unu el la batalĉevaloj de Lanti, fakte. Mi kritikis SAT-on, jes, kaj mi faris tion publike, sed ne en merkatplaco, sed en la asembleo de SAT-o.

Pro tio oni kondamnas min, kaj postulas ke mi eksoficiĝu pri la redakto de ĉi tiu magazino. Mi konsideras tiujn nesciaj vortoj, kaj sekve mi prezentas surdajn orelojn al ili. Sed mi klarigas tion pli longe en la artikolo sur paĝo 5-a, *Plendo*, kie mi ankaŭ pripensas maltoleremo, aŭ la malarto ne akcepti tion, kion fremdas al nia penso. Maltoleremo, en nia tempo, havas multefankan vizaĝon. Ĝi produktas ofte entombigon, enkarcerigon, sed ĉiam maljustigon kaj malestimon. Ni konsideru tion, kio okazas nun en Palestino. Mi ne povis silenti pri tiu afero, kaj pro tio, ke la kerno de la problemo estas la sama, mi rilatigas ambaŭ aferoj. Nun oni juĝas Milosevic-on ĉar —oni diras— li provis mortigi albanojn en Serbio. Tamen, oni ne tiom akre protestas kontraŭ Arjel' Ŝaron' pro tio, ke li provas mortigi palestinanojn. Diferenco estas, ke albanokosvanoj povis fuĝi al origina lando de sia kulturo, Albanio, dum palestinanoj ne povas fuĝi al alia loko. Se ili pereas, Palestino pereos. Eble la klarigo pri tio, ke Usono malhelpas kontraŭi fian judan politikon, kuŝas en vorto de Prezidento Johnson rilate al Prezidanto Noriega, de Panamao: *he is a bastard, but he is our bastard!* (Li estas fiulo, sed li estas nia fiulo!).

Jesuo

Informoj de la prezidanto

kotizon celante *plivalorigi* la bultenon aŭ la asocion, kiu ne estas *riĉula* sed *laborista*.

Estimataj samideanoj:

Vivo de asocio estas balotado: jen vivo. Asocio nedemokrata ne havas liberan balotadon, sed en Hale okazas malsame al tio. Ĉi tiu estraro opinias, ke finas sia periodo, kaj pro tio, ke ĝi ne tenas povon, sed emon servi HALE-Anojn, mi ilin alvokas partopreni la proksimiĝantan balotadon. Jen la tempo:



1° Prezentado de kandidatoj ĜIS LA 1^a DE OKTOBRO de 2002.

2° Balotado PERKORESPONDA de la 2^a DE OKTOBRO ĜIS LA 1^a DE NOVEMBRO de 2002.

3° PREZENTADO kaj ekfunciado de la NOVA ESTRARO LA 1^{AN} DE DECEMBRO de 2002.

Ni havas la laboron fari nombradon pri nia asocio, kreskigi ĝin, igi nian revuon eĉ pli solida, kvankam ĝi jam estas tia, ĉar ĝin oni vaste kaj abunde legas en Interreto, malgraŭ la malgranda nombro da abonantoj al papera versio. Pli ol okcent legadoj faras ĝin, laŭ mia opinio, flagŝipo de la esperanta laboristaro en Hispanio.

Pri mono, ni havas sufiĉe por vivi dum la venontaj tri jaroj, kaj okazas, ke ni havas apenaŭ modestajn enspezojn: sole la kotizojn al nia surpapera bulteno. Ĉu ses eŭroj estas tiom multe da mono, ĉu la modesteco de tiu kvanto malestimigas nian magazinon, tio restas netaksate, ĉar ni ne intencas artefarite kreskigi la

Aldone, ni per tio pruvas, ke asocio povas vivi sen granda enspezo.

Riĉigas nin, aliflanke, polemikoj. Kontraŭ tio, ke kelkaj kamaradoj plendas pro tio, ni trovas, ke asocio, kie ne estas variaĵo opinia, kie polemiko kaj diskuto estas fremdoj, ja suferas pro tro religieska trajto. Neniu dogmo regas nin, do malsamopinio nature venas kaj venos, kaj kontrasto da opinioj lumigas kaj espereble lumigos nian vojon ankoraŭ tre longe. Agi male signifus, ke HALEanoj sopiras al asocio religia. Por tio ne staras ĉi tiu estraro. Se HALEanoj deziras ŝanĝi tion, ili nepre profitu la okazon kaj ekstarigu kaj elektu alitipan estraron.

Altestime kaj bonkore,

Johano

Kandidatiĝo 2002:

La subskribanto sinprezantas al posteno de Prezidanto de HALE por la venonta periodo 2002-2006, kun la sekvanta ofikaro:

Prezidanto: _____

Vicprezidanto: _____

Sekretario: _____

Kasisto: _____

Redaktoro de la bulteno:

Rimarko: La kandidatiĝo devas esti ĉe la *Sekretario* la 1-an de oktobro de 2002.

Plendo



Estas plendo de Marteno Bustini Benito, ke mi devas ĉesi esti la redaktoro de **Kajeroj el la Sudo**, por esti honesta al mi mem, pro mia skandala eksigo el SAT. Eble li pravas. Du kialoj, tamen, malpermesas tion: unue, ne ŝajnas, ke estas anstataŭanto por tiu ĉi posteno. Ĉu kaŝe, ekskamarado Marteno celas per tiu peto, ke la bulteno malaperu? Nun HALE vere faras nenion alian ol la bulteno. Ĉu li vere celas, ke HALE malaperu?

La dua kialo estas, ke mia persona honesteco, kaj ne alia afero, kaŭzis mian liadire *skandalan* eksigon de SAT. Oni limigis serioze esprimliberecon kaj esprimpovon en Nagykanisza. Ne mi devis forlasi SAT, ekzakte. Sed pro tio, ke mi ne sentis min rajtigita postuli, ke oni eksigu malliberigantulon de la asocio, kaj pro tio, ke la asembleo verŝajne havis nenion diri fronte al tio, kion ĝi vidis, ke okazas, tute ne estis alia vojo al mi ol elliri asocion, kie oni manipulas liberdiron de ano de asocio, kie oni laŭstatute garantias liberesprimon kaj liberkritikon kaj liberproponon nur kiam oni honoros tiun statuton.

Ekskamarado Marteno asertas, ankaŭ, ke *argumento ne estas varo*, kaj sekve, *oni ne povas oferti ĝin*. Mi

nur diros, ke ni, malriĉuloj, kiuj ne havas varojn kunhavi kun niaj samideanoj aŭ, almenaŭ, kamaradoj, ni, kiuj ne havas monon aŭ iun alian aferon, ni povas, tamen, per rigora kaj disciplina uzado de niaj mensoj, almenaŭ ja oferti al niaj kunhavuloj la rezultojn de nia elpenso, tio estas, argumentojn. Jen la plej valoraj varoj, kiujn homo povas oferti homon. Manko da pensado kaj argumento ja produktis sufiĉe da malfeliĉo en nia kompatinda mondo. Bedaŭrindas, ke ni eĉ tie ĉi legis, ke kelkaj malsamopiniuloj ne rajtas publikigi siajn ideojn ĉi tie. Jen kaŭzo de milito. Nun ni vidas en la novaĵoj, ke estas maniero vidi vivon malpermesata en hodiaŭa Izraelo. Fakte, la gvidanto de popolo havanta tiun manieron de mi referencata, estas nun sieĝata en malgranda ĉambro de Palestino je la momento, kiam mi verkas ĉi tiun artikolon. Ne sole armeo ŝtata regata de fanatika dekstrulo sieĝas lin. Ankaŭ malkomprenemo, maltoleremo, faŝisteco kaj aliaj kompatindaj se ili ne estus eviteblaj trajtoj estas tie nun. Ni, hispanaj laboristoj, ne estas judaj, ni ne estas armistoj, ni ne estas supozinde dekstruloj, ni ne estas sangosoifaj..., sed bedaŭrinde, kelkaj inter ni ankoraŭ kunhavas kun tiu sensenca armeo la maltoleremon kaj *eldian rajtigismon* (kiu ajn estu tiuj dioj), kiuj igas ilin pensi, ke ili ne povas erari. Ili postulas, verŝajne, ke sia maniero vidi aferojn estas la sola deca, kaj pro tio, ne indas, ke oni aŭskultu aliajn diraĵojn ol tiuj, kiujn elfontas la



mi kunhavas kun la gvidanto de la palestina popolo.

Feliĉe por mi, la situacion fizikan kaj personan ne kunhavas mi kun li. Ni respektu lin kaj deziru, ke la blindeco de izraeloj baldaŭ finos, same kiel tiu usona jam elĉerpiĝis. Pretigante ĉi tiun artikolon, mi venis sur artikolon verkitan de Yasir' Arafato pri kian Palestinon li celas, kaj serĉante similan skribaĵon de Ariel Ŝaron', mi nur trovis kelkajn

biografiajn liajn, kiuj starigis miajn harpintojn¹.

Sed same kiel la problemo de Palestino ne estas Arafato, la problemo de Izraelo kiu ja riskas malaperon en ĉi tiu momento, Ŝaron ja certigos tion per siaj turpaj movoj

progresismaj kaj tradicie maldekstraj ideologioj (vere kvazaŭ teologio). Ili eble forgesas, ke dekstro kaj maldekstro estas konceptoj gestitaj de Karlo Magno, kiam li postulis, ke tiuj korteganoj, kiuj deziris ŝanĝi ĉion, staru je lia *maldekstro*, kaj ke tiuj, kiuj deziris, ke ĉio daŭrigu tiel, kiel ĝi estas, staru je lia *dekstro*. Sekve, tiuj, kiuj emas ŝanĝi staton pri aferoj ankoraŭ estas *maldekstruloj* kaj tiuj, kiuj emas tion, ke aferoj restu same, kiel ili estas, ja estas *dekstruloj*. *Progreso* estas plibonigi la nunan situacion. Sekve, tiuj, kiuj postulas, ke oni estu same kiel antaŭe, ja estas *dekstruloj*, eĉ se ili *mitas* en laŭnome *maldekstra* partio aŭ asocio.

Tiutage, Yasir Arafat' estas *maldekstrulo* en sia Palestino denaska, kaj la partio Likud' izraela estas *dekstro* kaj noma kaj fakta. Sed en ĉi tiu latitudo, en la Sudo de Eŭropo, verŝajne nomo kaj fakto maligas unu la alian... Tion



¹<http://www.danpal.dk/vidensbase/baggrund/bg-033.htm>
kaj <http://www.electronicintifada.net/forreference/keyfigures/sharon.html>

Sennacieca kaj Sennaciisma

Diferenciĝi inter “sennacieca” kaj “sennaciisma” ne estas “ebriĝo per vortoj”, kiel Jesuo skribis en n-ro 53 de *Kajeroj el la Sudo*. Ĝi necesas por kompreni la rilaton de SAT al la sennaciismo.

Sennacieco ne estas “kategorio pri la ideo ne havi nacion”, sed organizprincipo de SAT, kiu distingiĝas de la internacieco. En sennacieca organizaĵo, nacioj kaj nacieco ne estas strukturiga principo – tio estas ĉio. Difini organizaĵon sennacieca povas esti esprimo de distanciĝo disde la nacia fenomeno, sed ne havas jam la kvaliton de politika tendenco.

Sennaciismo laŭ la difino de Lanti estas “kultura doktrino, kies ĉefaj celoj estas: 1) Malapero de ĉiuj nacioj, rigardataj kiel sendependaj, suverenaj unuoj; 2) Mondmastrumado k racia utiligado de ĉia energio k materio profite al ĉiuj homoj de nia planedo; 3) Unuecigo je ĉiuj mezuroj k kalkuliloj; 4) Praktikado de sennacieca lingvo (Esperanto) kun la celo, ke ĝi fariĝu la sole uzata kulturlingvo. La sennaciismo signifas la venkon de l’ homeco super la nacieco; Ĝia realiĝo estus la triumfo en la homa cerbo de la racia tendenco super la mistike senta.”

Kiel ĉe ĉiu “ismo”, ankaŭ la kompreno pri sennaciismo evoluis. Laŭ mia percepto, tiuj, kiuj hodiaŭ sin nomas sennaciistoj aŭ pozitive rilatas al la sennaciismo, komprenas ĝin kiel tendencon, kiu kunigas a) radikalan

kontraŭnaciismon, kaj b) pozitivan orientiĝon al iu universalismo. Kelkaj pli, kelkaj malpli sekvas la ideojn de Lanti, troveblajn ekz. en la *Manifesto de la Sennaciistoj*.

Kiu konas SAT, scias, ke ĝia Sennaciisma Frakcio dum jaroj ne funkciis, sed restariĝis en Nagykanizsa. Kaj ĝi havas ekzistokialon. Necesas konstati la disvastiĝon de novdekstre influitaj etnonaciismaj kaj diferencismaj starpunktoj en la Esperanto-komunumo, precipe en tiu parto de ĝi, kiun oni false nomas la “neŭtrala” movado. Tiuj starpunktoj plej ofte rilatas al la protektado de etnaj identecoj, etnaj lingvoj kaj la “pureco” de etnaj lingvoj. Kiom ajn malmultaj ili estas, la sennaciistoj de la samnoma SAT-frakcio estas la sola organizita esperantista grupo, kiu kritike rilatas al tiu tajdo de naciismo.

Gary Mickle

Venas el antaŭa paĝo

estas sia vasta jesado al rasisma gvidanto, kiu, verŝajne, celas likvido de palestinanoj. Eĉ Hitlero devis subpremi ribelojn kontraŭ siaj sencelaj disponoj. Ŝaron, malsame, estas heroo. Profitante la neefikajn venĝadojn de kompatinduloj, kiuj perdis karulojn pro izraela misilado, li agas same senkompte kiel Saddam 'Hussein', ĉar li ne montras, ke malbonfarto de sia popolo alproksimigas lin al prudento kaj diskuto, kiuj estas patroj aŭ almenaŭ amikoj de paco kaj demokratio.

Jen mia plendo por toleremo ĉiuflanka kaj ĉiuloke.

La barelo de montiljesko

de Edgar Allan Poe



La milon da vundoj, kiujn al mi jam Fortunato faris, mi eltenis plej bone kiel eble, sed kiam li kuraĝis insulton, mi ĵuris venĝadon. Vi, kiu tiom bone konas la naturon de mia animo, ne supozu, tamen, tion ke mi vortumigis minacon. Finfine, mi venĝados, tio estis definitive decidate, sed tiu definitiveco, pri kiu mi estis tute certa, malebligis la ideon de risko. Mi ne nur devis puni, sed puni kun imuneco. Ofendo restas senvenĝata, se justigo atingas la paganton. Same ĝi estas senvenĝate, se la venĝanto ne sukcesas notigi sin tiel al punato.

Oni devas kompreni, ke nek vorte nek age mi dubigis Fortunaton pri mia bona volo. Mi daŭre ridetis al li, kiel kutime, kvankam li ne rimarkis, ke mia rideto nun ŝuldiĝas al penso pri lia ofero.

Li havis malfortan trajton, tiu Fortunato, kvankam alirilate li estis homo respektinda kaj eĉ timinda: li orgojlis pri sia konateco pri vino. Malmulte da italoj havas la veran virtisman spiriton. Plejparte ilia entuziasmo estas adoptita por alĝustiĝi al la momento kaj oportuno praktiki mensogon je britaj kaj aŭstraj milionuloj. Pri pentrarto kaj ĝemarto Fortunato, same kiel siaj samlandanoj, estis fraŭdo, sed temante pri malnovaj vinoj, li estis

sincera. Rigarde al tio, mi mem ne malsamis al li signife: mi estas kompetenta pri italaj vitaroj kaj mi aĉetas ĉiam, kiam mi povas.

Estis proksime al sunsubiro, tagon dum tiu supera frenezo de Karnivalo, kiam mi trovis mian amikon. Li haltigis min kun tro da varmeco, ĉar li jam drinkintis multe. La homo vestis *karnivale*, lia vestaĵo estis tre alĝustigita, kun multekoloraj strioj kaj lian kapon surmontis konika ĉapelo kun tintiloj. Mi estis tiom kontenta trovi lin, ke ŝajnis, ke mi neniam ĉesos premi lian manon.

Mi diris al li, “Mia kara Fortunato!, mi bonŝancas trovi vin. Kiel rimarkeble bone vi aspektas hodiaŭ! Sed mi ricevis barelon da montiljesko¹, kaj mi dubas.”

“Kiel?”, diris li, “Montiljesko? Pipo? Neeble! Kaj meze de Karnivalo?!”

“Mi havas dubojn”, mi respondis, “kaj mi estis sufiĉe stulta pagi la tutan prezon sen konsulti vin pri la afero. Vi ne estis trovebla, kaj mi timis perdi favoran ŝancon...”

“Montiljesko!”

“Mi dubas”.

“Montiljesko!”

“Kaj mi devas solvi ilin”.

“Montiljesko!”

“Pro tio, ke vi estas okupata, mi iras trovi Lukesjon. Se iu havas kritikan

¹Montiljesko estas vino blanka seka, origine farite en Montilla, provinco de Kordova, Hispanio. Aldirite, Amontillado.

Sed vi devas uzi ĉiun taŭgan zorgon. Buŝpleno da tiu Medoc defendos nin kontraŭ malsekeco”.

Tiun dirante, mi frapsenkoligis botelon, kiun mi prenis el longa vico de kolegoj ĝiaj, kiuj kuŝis en botelingaro.

“Drinku!”, mi diris prezentante la vinon al li.

Li levis ĝin al siaj lipoj kun grimaco. Li paŭzis kaj jesis al mi komplace, dum liaj tintiloj sonis.

“Mi drinkas”, li diris, “je tiuj enterigitoj, kiuj ripozas ĉirkaŭ ni”.

“Kaj mi je via longa vivo”.

Ni denove prenis niajn torĉojn kaj ni daŭrigis.

“Ĉi tiuj keloj”, li diris, estas vastaj”.

“Montrezoroj”, mi diris, “estis granda, multenombra familo”.

“Mi forgesas vian blazonon”.

“Granda homa piedo ora en kampo ĉielblua; la piedo subpremas rampantan serpenton, kies ŝirdentoj najlas en la kalkanon”.

“Kaj la devizo?”

“*Nemo me impune lacessit!*”.

“Bone!”, li diris.

La vino ekbrilis en liaj okuloj kaj la sonoriloj bruetis. Mia propra gajo varmiĝis pro la Medoc. Ni pasis tra muroj da arigitaj ostoj, kun bareloj kaj vinmezuriloj miksitaj, en la plej forajn partojn de la katakomboj. Mi paŭzis

denove, kaj ĉifoje mi kuraĝis preni Fortunato per lia brako, sur la kubuto.

“Salpetro!”, mi diris; “mi vidas, ke ĝi kreskas, ĝi pendas kiel fungoj el keloj. Ni estas nun sub la riverlito. Gutoj da humideco enmetas sin inter la ostoj. Venu, ni reiru antaŭ ĝi estas tro malfrue. Via malvarmo...”

“Estas nenio!”, li diris; “ni daŭrigu. Sed unue, alian buŝplenon da Medoc”.

Mi malfermis kaj donis al li kruĉon da De Grave. Li malplenigis ĝin dum sopiro. Liaj okuloj fulmis per sovaĝa lumo. Li ridis, kaj ĵetis la ujon supren per gesto, kiun mi ne komprenis.

Mi rigardis lin kun surprizo. Li refaris la movon, grotestkan movon. “Ĉu vi ne komprenas?”, li diris.

“Ne mi”, mi diris.

“Do vi ne estas de la frateco”.

“Kiel?”

“Vi ne estas masono?”.

“Jes, jes”, mi diris, “jes, jes!”.

“Ĉu vi? Neeble! Ĉu masono?”

“Masono”, mi respondis.

“Signon”, li diris.

“Jen tio”, mi respondis, prezentante trulon el sub la faldoj de mia mantelo.

“Vi ŝercas”, li eksklamis, malantaŭenirante kelkajn paŝojn. “Sed ni daŭrigu al montiljesko”.

“Estu tiel”, diris mi, remetante la ilon sub la mantelo, kaj denove ofertante al li mian brakon. Li apogis sin sur ĝi peze.

Ni daŭrigis nian iron al montiljesko. Ni trapasis malaltan arkarejon, subeniris,



¹Neniu kontraŭ mi restas senpuna.

²Sekvas vortoludo pri *masonisto* (laboristo) kaj *framasono* (ano de sekreta societo).

daŭrigis antaŭen, kaj subenirante denove, ni alvenis en profundan kripton, kies malpureco aera kaŭzis, ke niaj torĉoj lumis, sed ne plu brulis.

Je la alia ekstremo de la kripto aperis alia malpli spaca. Ĝiaj muroj estis limigitaj de homaj restoj, montante ĝis la plafono, laŭ la maniero de la grandaj katakomboj de Parizo. Tri flankoj de tiu interna kripto estis ankoraŭ ornamitaj tiumaniere. De la kvara muro la ostoj estis dismetitaj, kaj ili kuŝis senorde sur la planko, formante monteton en unu loko. En la muro tiel nudigita de ostoj oni vidis truan ankoraŭ pli internan, kies profundo estis metron kaj duonon, larĝo unu metron, kaj alto du metrojn. Ŝajnis esti konstruita por neniu kialo speciala, sed ĝi estis intervalo natura inter du el kolosaj apogoj de la tegmento, kaj je ĝia dorso estis solida muro de granito.

Vane Fortunato, levante sian torĉon senbrilan, klopodis vidi en la profundon de la murtruo. Ĝian finon malforta lumo ne permesis nin vidi.

“Daŭrigu!” mi diris, “montiljesko estas tie. Pri Lukesjo...”

“Li estas nesciulo”, interrompis mia amiko, antaŭenpaŝante turpe, dum ke mi tuj sekvis je siaj kalkanoj. Post momento li jam atingis la fundon de la truo, kaj trovis sian progreson haltigita de la roko. Li staris stulte konfuzita kaj ekkolera. Momenton poste mi jam katenis lin al granito. Ĉe ĝia surfaco estis du ŝekloj, kiuj kuŝis duonmetron unu de la alia horizontale. El unu el ili pendis katenon, el la alia, seruron. Ĵetinte la ĉenerojn ĉirkaŭ lian talion, estis nur kelkminuta laboro firmigi ĝin. Li estis tro konfuzita

por rezisti. Eligante la ŝlosilon, mi paŝis malantaŭen el la truo.

“Frotu vian manon laŭ la muro”, mi diris; “vi ne povas ne senti la salpetron. Ververe ĝi estas **tre** humida. Unufoje pli, permesu, ke mi **petegu** al vi reiri. Ĉu ne? Sekve, mi decide devas lasi vin. Sed antaŭe, mi dediĉu al vi la atentetojn, kiujn mi povas”.

“La montiljesko!”, elbuŝigis mia amiko, sen veni ankoraŭ de sia miro.

“Jes”, mi respondis; “la montiljesko”. Dirante tiujn vortojn, mi okupiĝis pri la monteto de ostoj, pri kiu mi parolis pli frue. Puŝante ilin flanken, mi baldaŭ malkovris kelke da ŝtonoj konstruaj kaj montento. Per tiuj materialoj kaj la helpo de mia trulo, mi komencis fortike murigi la eniron de la niĉo.

Mi finis apenaŭ la unuan vicon de masonado, kiam mi rimarkis, ke la entoksigo de Fortunato jam elĉerpas plejparte. La plej fruan signon, kiun mi havis pri tio, estis malakuta ĝemkrio, kiu venis de la profundo de la truo. Ĝi ja ne estis krio de drinkulo. Sekvis longa, obstina silento. Mi masonis la duan vicon, kaj la trian, kaj la kvaran; kaj tiam mi aŭdis furiozajn vibradojn de la kateno. La bruo daŭris kelkajn minutojn, dum kiuj, por aŭskultadi atente ĝin kun pli da ŝato, mi ĉesis mian laboron, kaj sidis sur la ostoj. Kiam fine la katenbruo silentis, mi daŭrigis la trulokupon, kaj finis seninterrompe la kvinan, la sesan kaj la sepan vicojn. La muro estis nun je la alto de mia brusto. Mi denove paŭzis kaj tenante la torĉon super la masonado, mi ĵetis kelkajn velkajn fulmojn sur la figuron internan.

Sekvo da laŭtaj kaj penetrantaj kriegoj, eksplodante subite en la gorĝo de la katenita formo, ŝajnis puŝegi min malantaŭen perforte. Momente mi hezitis..., mi tremis. Mi elŝeligis mian glaveton, mi palpis per ĝi la truon; sed tuja penso trankviligis min. Mi metis mian manon sur la solida masonaĵo de la katakomboj, kaj sentis min kontenta. Mi alproksimiĝis al la muro. Mi respondis al krioj de tiu, kiu klamas. Mi eĥis (mi helpis), mi preterlaŭtis kaj preterfortis ilin. Mi faris tion, kaj la klamanto silentis.

Nun estas notkomezo, kaj mia tasko venis al fino. Mi finintis la okan, la naŭan kaj la dekan vicojn. Mi jam finintis parton de la dekunua kaj lasta vico. Mankis nur unu ŝtono esti metita en sia loko kaj gluita tie. Mi luktis kun ĝia pezo; mi metis ĝin parte en la loko al ĝi destinita. Sed nun venis el la niĉo malakuta rido, kiu starigis mian hararon. Ĝin sekvis trista voĉo, kiun mi malfacile rekonis kiel tiun de nobla Fortunato. La voĉo diris:

“Ha!, ha!, ha!, he!, he!, he! Tre bonan ŝercon, vere. Bonegan ridindigon. Ni havos plenplene da rido pri tio en la palaceto. He!, he!, he!”

“La montiljesko!”, mi diris.

“He!, he!, he!, he!, he!, he!, Jes, la montiljesko. Sed ĉu ne malfruetas? Ĉu ili ne atendas nin

je la palaceto, sinjorino Fortunato kaj la ceteroj? Ni eliru”.

“Jes”, mi diris, “ni iru”.

“PRO AMO AL DIO, MONTREZORO!”

“Jes”, diris mi, “pro amo al Dio!”

Sed reagon al tiuj vortoj mi aŭskultadis vane. Mi malpacienis. Mi vokis laŭte:


“Fortunato!”

Neniu respondo. Mi vokis denove:

“Fortunato!”

Ankoraŭ ne respondo. Mi enpuŝis torĉon tra la restanta truo kaj lasis ĝin fali enen. Revenis nur sono de tintiloj. Mia koro ekmalsaniĝis..., pro la malsekeco de katakomboj. Mi rapidis fini mian laboron. Mi puŝis la lastan ŝtonon en ĝian pozicion; mi gluis ĝin tute. Kontraŭ la nova masonado mi restarigis la malnovan tranĉeton de ostoj. Dum duono da jarcento neniu mortulo profanis ĝin.

In pace requiescat²!



²Pace li ripezu.

Eo instruado en Publika bazlernejo de Aguidahoué, Lokossa

Antaŭ du jaroj mi senpage organizis feriajn kursojn en la bazlernejo *Aguidahoué* por helpi la lernantojn plialtigi sian studnivelon en la sekvanta jaro. Pro la intereso de la infanoj kaj instruistoj al la internacia lingvo, la Direktoro de la bazlernejo invitis min pri la enkonduko kaj la instruado de la lingvo en la tiea lernejo por la tutaj lernejoj.

Mi sabate gvidas la kurson de la 15a ĝis 18a horo posttagmeze laŭ la etoso de la kurso. Ni elektis la sabaton por ne malpermesi sekvi la normalan programon de la infanoj. Tamen, kvankam mi ne estas instruisto de la tiea lernejo, mi volonte vojaĝas el Lokossa al *Aguidahoué* per taksio-motorciklo pri la gvidkurso. Je mia granda surprizo, ĉiuj

infanoj volonte respektas la rendevuon kaj revenas al la kurso. Sed pro la studnivelo de la infanoj, mi instruas la kurson per cseh-metodo. Tiuj infanoj bone kantas, interparolas kaj konas la nomojn de la diversaj korpoj kaj fruktoj esperante. Kompare al aliaj bazlernejoj en Benino, tiuj infanoj ŝajnas bone agi pli ol la aliaj infanoj en Esperanto kvankam la infanoj de *Aguidahoué* ĵus faris plenan kursjaron. Por kuraĝigi la infanojn, mi disdonas al ili biksvitojn / kukojn por pli allogi ilin al la lingvo. Ili tre libervole lernas la lingvon kaj ekkorespondas esperante kun la lernejo «Hendrik Conscience» en Oostende (Belgio).

Surprize kaj okulfrape, Agnès Geelen (Belgio) kaj Gabriel Corsetti (Italio)



vizitis kaj festis kun la infanoj en la bazlernejo la 1an de januaro 2002. La venontan marton, tiuj infanoj akceptos la viziton de Rachel kaj David (gefranculoj) en la sama bazlernejo kadre de Esperanto.

Pro la Eoinstruado en la sola ĉi tiea bazlernejo en Aguidahoué, la kampovilaĝanoj multe interesas pri la lingvo kaj kreis «Agrikulturisto-klubon» en la vilaĝo.

Pli rideta, tiuj kampovilaĝanoj forlasas iomete al iomete la studadon de la denaska lingvo «kotafon» je la profito de la internacia lingvo en Aguidahoué.

La interesiĝantoj pri la infanoj povus sendi al ili salutvortojn aŭ kartvortojn por kuraĝigi ilin en la bazlernejo Aguidahoué.

Pliajn detalojn, bonvolu turni vin al:


François HOUNSOUNOU

BP 226 Lokossa-Mono

Rép du Bénin.

cobazlernejo-instruado@caramail.com

hounfranc@yahoo.fr



Ordinara Renkontiĝo de l'Estraro de HALE

La vendredon, 25-an de januaro de 2002 renkontis la estraro de HALE en la Parko Malecón de Mursja, kaj traktis la sekvajn punktojn:

1 Raporto de la Kasisto.-La kasisto, José María Bernabéu Franco, diras, ke restas 208.46 eŭroj (34 685 pesetoj) en nia konto.

2 Raporto de la Redaktoro de **Kajeroj el la Sudo**.- La redaktoro de **Kajeroj el la Sudo** diras, ke li ĵus sendis 50 ekzemplerojn de la numero 53-a al anoj de HALE, tiaj, kia tiu, kiun li montras en la kunveno. Aliflanke, li diras, ke oni jam ricevis la viziton de 250 esperantistoj en la elektronika versio de tiu numero, kiu kuŝas en <http://storm.prohosting.com/jesuo/k53.htm> kaj <http://www.iespana.es/Esperanto/k53.htm> dum la lastaj dek tagoj. Rilate al la numero de oktobro de 2001, oni jam vizitis ĝin 760 esperantistoj, kio estas rekorda nombro). Ankaŭ, li tradukis la tutan numeraron en novan sistemon *Unikodon*, kio ebligas, ke oni povas legi la magazinon en korekta Esperanto (supersignita) eĉ se la leganta komputilo ne havas ilin.

3 La letero de Marteno.- La prezidanto ricevis leteron de Marteno Bustin' Benito¹, per kiu li petis la demision de la nuna redaktoro de la bulteno pro ties neaparteno al Sennacia Asocio Tutmonda (SAT). La redaktoro kaj la prezidanto klarigas sufiĉe siajn rifuzajn opiniojn ĉirilate kadre de la venonta n-ro de la bulteno.

4 Eksiĝo de la kasisto.- Pro la *fifartaj kaŭzoj* (laŭ lia diro), la kasisto ne plu volas esti en sia posteno. Li decidis eksiĝi de sia posteno kiel kasisto, sed ne de HALE.

Tial la prezidanto decidis alvoki al balotado ĝenerala por anstataŭi la nunan estraron. Oni faros la oficialan ALVOKON ene de la proksima numero de la Bulteno de HALE².

4 Komerca propagando. La kamarado sekretario proponis ekkomenci kampanjon por kaj kontraŭ la aperigo en la bultenon de HALE de propagandiloj rilate privatajn firmaojn en Esperanto por akiri monon sufiĉan pro ke nia asocio ekagu favore al Esperanto kaj la malriĉularo, krom la agado de **Kajeroj el la Sudo**.

Kaj ne havante pli da aferoj por pridiskuto, ni foriris je la 10-a horo vespere de la vendredo, la 25-a de januaro de 2002.

*La sekretario,
José Pina Tuells.*

¹Vidu paĝo 5-a.

²Vidu paĝon 4-an.

La Faraono

CAPITRO V

La taĉmento de l' kronprinco proksimiĝis al Memfiso kaj dume la suno kliniĝis al la okcidento, kaj de la sennombraj kanaloj kaj de la malproksima maro leviĝis vento, saturita de mal-



varma malsekeco. La ŝo-

re-

nis al la fruktodonaĵoj, sur la kampoj kaj en la arbetoj oni vidis seninterrompajn vicojn de laboristoj, kvankam sur la de-

zertoj jam falis ruĝa brilo, kaj la montaj suproj flame brulis.

Subite Ramzes haltis kaj turnis posten la ĉevalon. Tuj ĉirkaŭis lin la sekvanto, alrajdis la altrangaj oficiroj kaj malrapide, per egalaj paŝoj, proksimiĝis la marŝantaj reĝimentoj.

En la purpuraj radioj de la subiranta suno la princo similis dion; la soldatoj rigardis lin kun fiero kaj amo, la ĉefoj kun miro.

Li levis la manon, ĉiuj eksilentis, kaj li komencis paroli:

-Eminentaj ĉefoj, bravaj oficiroj, obeemaj soldatoj! Hodiaŭ la dioj konigis al mi la dolĉecon komandi tiajn homojn, kiel vi. La ĝojo plenigas mian princan koron. Kaj ĉar mia volo estas, ke vi, ĉefoj, oficiroj kaj soldatoj, dividu ĉiam mian feliĉon, mi do destinas: po unu draĥmo por ĉiu el la soldatoj, kiuj foriris orienton kaj por ĉiu el tiuj, kiuj revenas kun ni de la orienta limo. Krom tio po unu draĥmo al ĉiu el la grekaj soldatoj, kiuj hodiaŭ sub mia komando malfermis al ni la eliron el la intermonto kaj po unu draĥmo al la soldatoj de tiuj reĝimentoj de Nitager, kiuj volis bari al ni la vojon...

La soldatoj ekbolis.

-Saluton al vi, nia estro!... Saluton al vi, heredonto de l' faraono (li vivu eterne!) - kriis la soldatoj, kaj plej laŭte la Grekoj.

La princo daŭrigis:

-Por la oficiroj kaj por lia ekscelenco Nitager mi destinas kvin talentojn. Fine por la ministro kaj la generaloj dek talentojn...

-Mi lasas mian parton por la armeo - respondis Herhor.

-Saluton al vi, kronprinco!... saluton al vi, ministro!... - kriis la oficiroj kaj soldatoj.

La ruĝa disko de la suno jam tuŝis la sablojn de la okcidenta dezerto. Ramzes adiaŭis la soldatojn kaj galope forrajdis Memfison, kaj lia ekscelenco Herhor, akompanata de ĝojaj krioj, sidiĝis en la

portilon kaj ordonis ankaŭ preterpasi la marŝantajn taĉmentojn.

Kiam ili estis sufiĉe malproksime kaj la apartaj voĉoj kunfandiĝis en unu grandan murmuron, similan al bruoj de l' akvofalo, la ministro kliniĝinte al la skribisto Pentuer, diris:

-Ĉu vi memoras ĉion?

-Jes, via ekscelenco.

-Via memoro estas kiel la granito, sur kiu ni skribas la historion, kaj via saĝo kiel Nilo, kiu superverŝas kaj fruktigas - diris la ministro.

-Krom tio la dioj favoris vin per plej granda virto- per prudenta humileco...

La skribisto silentis.

-Vi do povas pli precize juĝi la agojn kaj la saĝon de la kronprinco, kiu vivu eterne!

Momenton la ministro ripozis. Ne estis lia kutimo paroli tiel multe.

-Diru do al mi, Pentuer, kaj notu tion: ĉu estas konvene, ke la kronprinco antaŭ la armeo proklamas sian volon?... Tiel agi povas nur la faraono, aŭ perfidulo, aŭ... senkonsidera junulo, kiu same

facile faras maljustajn agojn kaj diras malpiajn vortojn...

La suno subiris, kaj post momento ekregis stelplena nokto. Super la sennombraj kanaloj de Malsupra Egipto komencis densiĝi argenta nebulo, kiun delikata vento alportis ĝis la dezerto, refreŝigis la lacajn soldatojn kaj saturis la kreskajojn, jam agoniantajn de l' soifo.

-Aŭ diru al mi, Pentuer- daŭrigis la ministro -kaj esploru: kie la kronprinco trovos 20 talentojn por plenumi la promeson, kiun li faris tiel senpripense? Cetere, kie ajn li trovos la monon, ŝajnas al mi kaj kredeble ankaŭ al vi danĝera afero, ke la kronprinco faras donacojn al la armeo ĝuste en la tago, en kiu lia sankteco ne havas monon por pagi la soldon al la

reĝimentoj de Nitager, revenantaj de l' oriento. Mi ne demandas vin pri via opinio, ĉar mi konas gin, kiel vi konas miajn plej sekretajn pensojn. Mi petas nur, ke vi ekmemoru, kion vi vidis, por rakonti tion en la kolegio de l' pastroj.



-Ĉu baldaŭ ĝi estos kunvokita? - demandis Pentuer.

- Oni ne havas ankoraŭ kaŭzon por tion fari. Mi provos antaŭe kvietigi la furiozantan boveton per la patra mano de lia sankteco... Mi tre bedaŭras la junan knabon, ĉar li havas grandajn kapablojn kaj energion de la suda vento. Sed se la uragano, anstataŭ forblovi la malamikojn de Egipto, komencos kuŝigi gian tritikon kaj eltiri ĝiajn palmojn!...

La ministro eksilentis, kaj lia sekvantaro dronis en la malluma aleo de arboj, kiu kondukas al Memfiso.

En la sama momento Ramzes atingis la palacon de l' faraono.

Ĉi tiu konstruaĵo staris sur altaĵo ekster la urbo, en parko. Tie kreskis strangaj arboj: baobaboj de l' Sudo, cedroj, pinoj kaj kverkoj de l' Nordo. Dank' al la arto de l' ĝardenistoj ili vivis kelkdekon da jaroj kaj atingis grandan altecon.

Ombra aleo kondukis de malsupre al la pordego, kiu havis altecon de trietaĝa domo. De ĉiu flanko de la pordego staris potenca konstruaĵo, kvazaŭ turo, de la formo de detranĉita piramido, kvardek paŝojn larĝa, kvin etaĝojn alta. Nokte tio similis du grandegajn tendojn el sablostono. Ĉi tiuj strangaj konstruaĵoj havis en ĉiu etaĝo kvadratajn fenestrojn, kaj platajn tegmentojn. De la supro de unu piramido gardistoj observis la teron, de la alia — deĵoranta pastro rigardis la stelojn.

Dekstre kaj maldekstre de la turoj, nomataj pilonoj, sin etendis muroj au pli guste kelketagaj konstruaĵoj, kun mallarĝaj fenestroj kaj plata tegmento,

sur kiu pasis gardistoj. Ĉe ambaŭ flankoj de la pordego sidis du statuoj, kies kapoj atingis la duan etaĝon; ĉe la piedoj de la monumentoj ankaŭ paŝis gardistoj.

Kiam la princo akompanata de kelke da kavaliroj proksimiĝis al la palaco, la gardisto, malgraŭ la mallumo, rekonis lin. Post momento elkuris el la pilono kortega oficisto, vestita per blanka jupo, malhela mantelo kaj peruko, simila per sia grandeco al kapuĉo.

-Ĉu la palaco jam estas fermita? - demandis la princo.

-Vi diris la veron, nobla sinjoro - respondis la oficisto. -Lia sankteco vestas la diojn por la dormo.

-Kaj poste kion li faros?

-Li bonvolos akcepti la militan ministron, Herhoron.

-Poste?

-Poste lia sankteco iom rigardos en la granda Salono baleton, kaj poste li banos sin kaj diros la vesperajn preĝojn.

-Oni ne ordonis akcepti min? - demandis la kronprinco.

-Morgaŭ post la milita konsilo.

-Kaj kion faras la reĝinoj?

-La unua reĝino preĝas en la ĉambro de sia mortinta filo, kaj via glora patrino akceptas fenician senditon, kiu alportis al ŝi donacojn de la virinoj de Tiro.

-Cu ankaŭ belajn knabinojn?

-Kelke, oni diras. Ĉiu portas sur si multekostajn objektojn por dek talentoj.

-Kiu vagas tie kun torĉoj?- diris la princo, montrante per la fingro la malsupron de l' parko.

-Oni demetas de l' arbo la fraton de via ekscelenco; li sidas tie de la tagmezo.

-Kaj li ne volas malsupreniri?

-Nun, li malsupreniros, ĉar la arlekeno de la unua reĝino venis al li kaj promesis konduki lin en la drinkejon, kie trinkas la parazitaj, kiuj malfermas la kadavrojn de l' mortintoj.

-Ĉu vi jam aŭdis ion pri la hodiaŭaj manovroj?

-Oni diris en la ministrejo, ke la stabo estis fortranĉita de sia korpuso.

-Kion plu?

La oficisto ŝanceliĝis.

-Diru, kion vi aŭdis.

-Ni ankaŭ aŭdis, ke pro tio via ekscelenco ordonis doni al iu oficiro kvincent bastonbatojn, kaj pendigi la gvidiston.

-Ĉio estas mensogo!- interrompis duonvoce unu el la adjutantoj de l' kronprinco.

-Ankaŭ la soldatoj diras, ke tio devas esti mensogo- respondis pli kuraĝe la oficisto.

La kronprinco turnis la ĉevalon kaj forrajdis al la malsupra parto de la parko, kie estis lia palaceto. Ĝustadire tio estis unuetaĝa kiosko el ligno. Ĝi havis la formon de grandega kubo kun du verandoj, unu supre, la alia malsupre, kiuj ĉirkaŭis la konstruaĵon apogitaj sur multenombraj kolonoj. Interne lumis

torĉoj, oni do povis vidi, ke la muroj konsistas el tabuloj skulptitaj, kiel punktoj, kaj ke ili estas gardataj kontraŭ la vento per multkoloraj kovriloj. La tegmento de la domo estis plata, ĉirkaŭita per balustrado; sur la tegmento estis kelke da tendoj.

Kore salutita de la duonnudaj servistoj, el kiuj unuj kuris renkonte al li, aliaj sin jetis antaŭ li sur la vizaĝon, la kronprinco eniris en la domon. En la loĝejo de la surtera etaĝo li demetis la pulvoplenajn vestojn, sin banis en stona banujo kaj ĵetis sur sin specon de granda litotuko, kiun li bukis sub la kolo, kaj sur la zono ĉirkaŭligis per ŝnuro. En la dua etaĝo li vespermangis: li manĝis tritikan platan kukon, plenmanon da daktiloj kaj trinkis pokalon da malforta biero. Poste li suriris la terason de la domo kaj kusiĝinte sur kanapo kovrita per leona felo, li ordonis al la servistoj foriri kaj sendi supren Tutmozison, tuj kiam li venos.

Ĉirkaŭ la noktomezo antaŭ la domo haltis portilo, el kiu eliris la adjutanto Tutmozis. Kiam li peze enpaŝis sur la terason oscedante, la princo salte leviĝis de l' kanapo.

-Jen vi estas?... Kio do?...- ekkriis Ramzes.

- Vi ankoraŭ ne dormas?... - respondis Tutmozis. - Ho dioj, post tiom da tagoj de laciĝo!... Mi pensis, ke mi povos dormeti almenaŭ ĝis la leviĝo de l' suno.

-Kaj Sara?

-Ŝi estos ĉi tie postmorgaŭ, aŭ vi ĉe ŝi en la bieno trans la rivero.

-Nur postmorgaŭ!...

-Nur?... Mi petas vin, Ramzes, satdormu. Tro multe da nigra sango kolektiĝis en via koro kaj tial via kapo flamas.

-Kaj ŝia patro?...

-Li ŝajnas homo prudenta kaj honesta. Lia nomo estas Gedeon. Kiam mi diris, ke vi volas preni lian filinon, li falis teren kaj komencis elŝiri al si la harojn. Kompreneble mi atendis, ĝis kvietiĝis la patra doloro, mi iom manĝis kaj trinkis kaj ni komencis trakti la aferon. La ploranta Gedeon unue ĵuris, ke li preferus vidi sian filinon kadavro, ol ies konkubino. Tiam mi diris, ke proksime de Memfiso sur la bordo de Nilo li ricevos bienon, kiu donas du talentojn da ĵara profito kaj ne pagas impostojn. Li ekindignis. Tiam mi anoncis, ke li povus ricevi krom tio ĉiujare unu talenton en oro kaj en arĝento. Li eksopiris kaj diris, ke lia filino dum tri jaroj lernis en Pi-Bailos. Mi aldonis ankoraŭ unu talenton. Nun Gedeon, ĉiam nekonsolebla, murmuretis, ke li perdas tre bonan oficon de intendanto ĉe sinjoro Sezotris. Mi diris, ke li ne bezonas forlasi ĉi tiun oficon kaj mi aldonis dek bovinojn el via bovinejo. Lia frunto iom sereniĝis, kaj li konfesis al mi tute konfidence, ke sur

lian filinon turnis sian atenton granda sinjoro, Ĥaires, kiu portas ventumilon super la nomarĥo de Memfis. Mi promesis tiam aldoni al li junan bovon, malgrandan oran cenon kaj grandan braceleton. Tiamaniere Sara kostos al vi bienon kaj dek talentojn ĵare, kontante, kaj dek bovinojn, bovon, oran ĉenon kaj braceleton unufoje.

- Kion diris Sara? - demandis la princo.

- Dum la negocado ŝi promenis inter la arboj. Kaj kiam ni finis la aferon kaj trinkis bonan hebrean vinon por sukceso, ŝi diris al la patro... Cu vi scias kion? Ke se li ne estus doninta ŝin al vi, ŝi surirus ŝtonegon kaj saltus de ĝia supro. Nun mi esperas, ke vi dormos trankvile, - konkludis Tutmozis.

-Mi dubas- diris la kronprinco sin apogante sur la balustradon kaj rigardante la plej malplenan aleon de l' parko. -Ĉu vi scias, ke ni renkontis sur nia vojo pendigitan kamparanon?...

-Oh!... tio estas pli malbona ol la skaraboj!
- siblis Tutmozis.

-Li mem pendigis sin, pro ĉa-
greno, ke la ar- meo plen-
ŝutis lian meo plen-



kanalon, kiun li fosis en la dezerto dum dek jaroj.

-Li jam dormas profunde. Eble do venis la tempo ankaŭ por ni...

-Maljuste, tre maljuste oni agis kontraŭ li, - oni devas trovi liajn infanojn, pagi por ilia liberigo kaj ludoni al ili pecon da tero.

-Sed oni devas fari tion tute sekrete- interrompis Tutmozis -ĉar aliel ĉiuj kamparanoj komencos sin pendigi, kaj al ni, iliaj sinjoroj, neniŭ Feniciano pruntos eĉ kupran utenon.

-Ne ŝerecu. Se vi estus vidinta la vizaĝon de la kamparano, vi ne povus ekdormi, same kiel mi.

Subite, de malsupre, inter la arbetoj, eksonis neforta, sed klara voco:

-Benu vin, Ramzes, la Dio sola kaj ĉiopova, kiu ne havas nomon en la homa lingvo, nek statuojn en la temploj!...

Ambaŭ junuloj mirigitaj sin klinis trans la balustradon.

-Kiu vi estas? - ekkriis la princo.

-Mi estas la premezata egipta popolo- malrapide kaj kviete respondis la voĉo.

Poste ĉio eksilentis. Neniŭ movo, neniŭ brueto de l' folioj perdis la ĉeston de homa estaĵo en ĉi tiu loko.

Laŭ la ordono de la princo la servistoj elkuris kun torĉoj, oni ellasis la hundojn kaj traserĉis ĉiujn arbitaĵojn, cirkauantajn la domon de l' kronprinco. Sed oni trovis neniun.

-Kiu tio povis esti?... - demandis la emociita princo la adjutanton.

-Eble la spirito de tiu ĉi kamparano?...

-La spirito?...- ripetis Tutmozis. -Mi neniam aŭdis parolantajn spiritojn, kvankam mi ofte staris garde ĉe la temploj kaj tomboj. Mi supozas, ke tiu, kiu parolis al ni, estas iu via amiko.

-Kial li kaŝus sin?

-Ĉu tio malutilas al vi?...- diris Tutmozis. -Ĉiu el ni havas centojn, eble milojn da kaŝitaj malamikoj. Danku do la diojn, ke vi havas almenaŭ unu nevideblan amikon.

-Mi ne ekdormos h o d i a ŭ -
murmuretis la ekscitita princo.

-Lasu tion... Anstataŭ kuri sur la teraso, obeu mian konsilon kaj kuŝiĝu. Aŭskultu, la dormo estas serioza dio kaj ne konvenas al li persekuti tiujn, kiuj kuras kiel cervo. Kontraŭe, se vi kuŝiĝos sur komforta kanapo, la dormo kiu amas la komforton, sidiĝos apud vi kaj metos sur vin sian grandan mantelon, kiu kovras al la homoj ne nur la okulojn, sed ankaŭ la memoron.

Dirante tion Tutmozis sidiĝis la kronprincon sur la kanapo, poste alportis apogilon el eburo, kiu havis formon de nova luno, kaj kuŝiĝinte la filon de l' faraono, li metis lian kapon sur la apogilo.

Poste li mallevis la lanajn tukojn de la tendo, li mem kuŝiĝis sur la planko, kaj post kelke da minutoj ili ambaŭ ekdormis.



Dek unu insuloj

Iam estis dek unu insuloj meze de oceano, proksime de kiuj ŝipo subakvigis. Post la katastrofo, homoj atingis ne la saman insulon, kaj je la fino la insularo havis tiujn popolojn:

-Unua insulo: du italoj kaj unu italino.

-Dua insulo: du francoj kaj unu francino.

-Tria insulo: du germanoj kaj germanino.

-Kvara insulo: du grekoj kaj unu grekino.

-Kvina insulo: du angloj kaj anglino.

-Sesa insulo: du bulgaroj kaj bulgarino.

-Sepa insulo: du usonanoj kaj usonanino.

-Oka insulo: du irlandanoj kaj irlandanino.

-Naŭa insulo: du japanoj kaj japanino.

-Deka insulo: du hispanoj kaj hispanino.

Dek unua insulo: sennaciulo, naskiĝinta en Benino.

Evidente, pasis la tempo, kaj post unu monato la situacio en la insularo evoluis jene:

-Unua insulo: italo mortigis la alian italon por havi la italinon sole por si.

-Dua insulo: la du francoj feliĉe vivis kun sia francino en kortuŝa *menage á trois* (triparta paro).

-Tria insulo: la du germanoj sukcesis trovi horaron por seksumi vice kun la

germanino.

-Kvara insulo: la du grekoj amas unu la alian, kaj la grekino kuiras por ili.

-Kvina insulo: la du angloj ankoraŭ atendas tion, ke venu iun prezenti ilin al la anglino.

-Sesa insulo: la unuan tagon de la monato la du bulgaroj rigardis al la bulgarino kaj subite fornaĝis.

-Sepa insulo: la du usonanoj konsideras altiran penson pri memmortigo dum ke la usonanino parolas pri ŝi mem, liberigo de virinoj, la bezono de interna trankvilo, egaleco, ŝia lasta fianĉo, kaj tiel plu. Tamen, impoŝtoj estas malgrandaj.

-Oka insulo: irlandanoj dividis la insulon en du partoj, Nordo kaj Sudo, kie ili malfermis bierejojn. Ili ne memoras ĉu ili seksumis kun la irlandanino post kelke da litroj da biero kokosa, sed ili estas feliĉaj, ĉar angloj ne estas proksime.

-Naŭa insulo: la du japanoj sendis fakson al Tokio kaj ankoraŭ ili atendas manlibron.

-Deka insulo: ĉiu hispano kredas, ke la hispanino seksumas nur kun li.

-Dekunua insulo: sennaciulo naĝis al ĉiu alia insulo turismumi. Li sukcesis lernigi Esperanton al virinoj cele al interesaj rilatoj, per la ĉea metodo. Pro tio, ke lin komprenis ĉiuj, oni proponis nomumi lin estro de la insularo, sed li fuĝis al sia dekunua insulo, kaj askete li pasis la ceteran parton de sia vivo, konsiderate modelo por homa rilato.

Dubo.

Enkonduko en muzikon

Piano

Fortepiano, aŭ simple *piano*, estas konsiderata la plej gravan muzikilon en okcidenta kulturo. Mi opinias, ke muzikilo estas tiom grava, kiel ĝia muziko, kaj muziko estas produkto nur de altkvalita laborado. Mi dubas, tamen, ke elstaraj muzikistoj limigis sin al aparta instrumento, sed ili vere komponis *muzikon* ne *muzikilaĵon*. Kial, do, piano ĝuas tiun favoran rolon en nia muziko?

Nu, piano estas instrumento, kiu havas preskaŭ ĉiujn *sonojn*, kiun orĥestro povas fari. Vere estas, ke mankas al ĝi la riĉeco pri *koloroj* muzikaj, tio, kion muzike oni konas kiel *tembron*. Sed veraj muzikistoj, kiel Beethoveno, Mozarto, kaj similaj, ja povis imagi la diversajn tembrojn el pianaj sonoj. Veras, ke orgeno preĝeja havas kaj la sonojn kaj la tembrojn —aŭ almenaŭ ion tre simile al ili—, sed estas komplikaj teknikaj malhelpoj pri tio, kio estis farebla en



la jaroj, kiam la okcidentan muzikon oni konceptis en la formo, kiel ĝi venis al ni. Sekve, piano utilis kiel kabineta sonorigilo de la majstraj verkoj de tiuj majstroj, kiuj poste nepre sonigis ilin per orĥestro.



Evident-
as la
fakto, ke
estas mul-

ta kaj ĉarma muziko por piano: ni pensu pri Ĉopin', Liŝt, Beethoveno mem, Mozarto, kaj longa tiel plu. Tio estas, mia opinie, eltrovaĵo de tiuj komponistoj. Sed ankoraŭ mi ne trovis muzikpecon, kiu ne sonas pli bone orĥestre ol plane, eĉ se oni konceptis ĝin origine por piano sola.

Piano ludis, tamen, gravegan parton en endomigo de muziko de kiam ne ekzistis fonografo. Franz Liŝt, ekzemple, verkis pianigon de la *Kvina Simfonio* de Beethoveno, tiel disvastigante ilin ĉien, kie ne povis veni orĥestro.

En ĉi tiu paĝo vi vidas la klasikan *horizontalan* (aŭ *vostan*) pianon, kaj plej modernan *elektronikan* pianon. Tiu ĉi ebligas duan mondiskalan disvastigadon de piano.

Ni parolos iomete pri la historio de tiu ĉi instrumento la venontan fojon

Jesuo de las Heras



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461, Tfn° (00 34) 615
E30080 MURCIA, 427 143
HISPANIO

Retskribu al
jesuo@ono.com

<http://storm.prohosting.com/jesuo>

<http://www.iespana.es/kajeroj.htm>

Esperanto@iespana.es

STATUTO de SAT

PLENUM-KOMITATO

11. Por eviti ĉian naciecan influon en la gvidado de la Asocio, validas la elekto de P.K. nur en la okazo, se la enlandaj jesaj voĉoj por la kandidatoj en iu lando ne superas 1/3 de la tuta balotintaro. Aliokaze validu elekto de aliaj kandidatoj kiuj ricevis pli ol trionon da voĉoj el la tuta balotintaro, sed tiuj estas dividitaj en pli normalaj maniero laŭ landoj. Kiam estas kandidatoj en pli ol du diversaj urboj, tiam validu la elekto de tiu(j), kiu(k) ricevis la absolutan plimulton. Aliokaze refoja baloto estu aranĝata inter tiuj du kandidataj urboj.
12. En okazo de ekŝiĝo(j) de P.K.-ano(j), la membraro en la urbo de l' sidejo elektas antaŭantojn. Se ekŝiĝis samtempe pli ol la 1/2 de la tuta P.K., tiam ĝi organizas novelekton laŭ paragrafo 11. En okazo de ekŝiĝo de la tuta P.K. pro kontraŭstatuta agado, la K.K. anstataŭas provizore la P.K.-on ku la tasko kiel eble plej baldaŭ okazigi referendumon por elekti novan P.K.
13. Rajtas esti membro de la Plenum-Komitato nur membro havanta 3 sinsekvajn jarojn da aktiva membreco kaj skribe promesinta firme kaj aktive defendi en Pciuj cirkonstancoj la celojn, principojn kaj interesojn de la Asocio.

La 5^a paĝo de la Statuto de SAT